# Sud-Rejna Kuriero

Novembro 2015

**Komuna inform-bulteno de**
**Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto**

N°60

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*

*Oktobro estis riĉa je eventoj, komence okazis migrado-tago en la Nigra Arbaro kaj samtempe komenciĝis semajno en Hispanio en urbo Roses.*

*Tuj poste, la aŭtuna staĝo allogis al Pforzheim por renkonti geamikojn kaj kune ĝui Esperanto-semajnfinon kaj turismadon.*

*En novembro nia grupo kuraĝe decidis partopreni deĵoradon en Illzach ĉe Bédéciné kaj semajnon poste en Ungersheim ĉe Ekologia foiro.*



*Agrablajn kaj feliĉajn Kristnasko-festo-tagojn*

*Nia biblioteko riĉiĝis je nova libro, historio de esperanta literaturo. pri kiu Bernard volonte informas.*

*En decembro okazos la kutima Zamenhof-festo, ĉi-jare en Frajburgo. Ni kune ĝuu tiun eventon kaj ni ĝoju pro nia esperantisteco.*

*Daŭre kaj alloge funkcias niaj verdaj fadenoj en Mulhouse kaj Saint-Louis*

*André Grossmann*

## Programo 2015/2016

### ESPERANTO - SOCIETO BASEL

| | | |
|---|---|---|
| Dimanĉe | 13.12.2015 | Zamenhofa Festo en Frajburgo |
| Ĵaŭde | 28.1.2016 | Ĝenerala jarkunveno |
| Lunde | 29.2.2016 | Verda fadeno en la Poste |
| Ĵaŭde | 31.3.2016 | (pro Pasko) Monata kunveno : Babilado |
| Lunde | 25.4.2016 | Verda fadeno en la Poste |
| Ĵaŭde | 19.5.2016 | (pro Fronleichnam) Monata kunveno : Grün 80 |
| Lunde | 27.6.2016 | Verda fadeno en la Poste |

**FERIOJ**

| | | |
|---|---|---|
| Ĵaŭde | 22.9.2016 | Monata kunveno : Aktuala temo |
| Lunde | 31.10.2016 | Verda fadeno en la Poste |
| Ĵaŭde | 24.11.2016 | Monata kunveno : Programo |
| | 12.2016 | Zamenhofa-Festo en Francio eble en Colmar |

**Nicole Béroud**




*El tuta mondo la Esperanto-komunumo sendis mesaĝojn al la francaj esperantistoj kaj Esperanto-asocioj por esprimi el-korajn sentojn kaj kondolencojn pro la tre doloraj okazintaĵoj en Parizo la 13-an de novembro 2015.*

# Ein Denkanstoss zur COP21

Als die alte Frau die Plastiktüte wählte, um ihre Lebensmitteleinkäufe einzupacken, hat ihr die Verkäuferin vorgeworfen, nicht „grün“genug zu sein :

Die Verkäuferin sagte, dass die Generation dieser alten Frau einfach die Umweltbewegung nicht versteht, nur die Jungen werden für diese alte Generation bezahlen, die alle Ressourcen verschwendet hat :

Die alte Frau hat sich entschuldigt und hat erklärt :

„Es tut mir leid, zu unserer Zeit gab es noch keine grüne Bewegung“.

Als sie etwas niedergeschlagen den Laden verließ, hat die Kassiererin hinzugefügt :

„Leute wie sie haben alle Ressourcen auf unseren Kosten ruiniert. Es ist wahr zu ihrer Zeit hat man den Umweltschutz überhaupt nicht gekannt“.

Die alte Frau gab. zu dass man damals die Milch-, Cola- und Bierflaschen zurückgebracht hat. Der Laden schickte sie zur Fabrik zurück, damit sie gewaschen, sterilisiert und wieder aufgefüllt wurden. Man benutzte die gleichen Flaschen mehrmals. Zu dieser Zeit waren wirklich wiederverwendet, aber man kannte die grüne Bewegung nicht.

Zu meiner Zeit gingen wir zu Fuß die Treppe hinauf, wir hatten keine Rolltreppen in allen Läden oder Büros. Wir liefen auch zum Tante-Emma-Laden. Wir nahmen nicht einen 300 PS-Wagen jedes Mal, weil man um zwei Ecken musste. Aber es stimmt, man kannte die grüne Bewegung nicht

Damals hat man die Windel der Babys gewaschen, man kannte keine Wegwerfwindeln. Man brachte die Kleider hinaus zum Trocknen, nicht in einen Wäschetrockner mit 220 Volts. Man benutzte Wind-und Sonnenenergie, um die Kleider zu trocknen.

Damals hat man systematisch die Kleider recycelt, indem man sie von Brüder zu Brüder oder von Schwestern zu Schwestern weitergegeben hat .Wirklich ! Man kannte keine grüne Bewegung.

Damals hatte man nur einen Fernseher oder Radio im Haus, nicht ein Fernseher in jedem Zimmer. Und der Fernseher hatte einen Bildschirm in der Größe einer Pizza Schachtel. Nicht ein Bildschirm

in der Größe des Staates Montana.

In der Küche hat man sich angestrengt,um die Gerichte und ganze Mittagessen vorzubereiten, man besaß nicht alle elektrischen Geräte, um alles mühelos vorzubereiten.

Wenn man zerbrechliche Teile einpackte, um sie mit der Post wegzuschicken, stopfte man Papier oder Watte drumherum und keine Schaumblasen aus Polystyrol oder Plastik.

Damals hat man die Kraft der Arme benutzt um den Rasen zu mähen, man hat nicht selbstgesteuerte Benziner.

Zu jener Zeit hat man körperlich hart gearbeitet. So brauchte man nicht ins Fitnesszenter zu gehen, um auf Rollbändern , die elektrisch angetrieben werden, zu rennen. Aber sie haben recht man kannte die grüne Bewegung nicht.

Damals trank man Wasser vom Brunnen, wenn man durstig war. Man benutzte nicht Plastiktassen oder -Gläser jedes Mal wenn man Wasser nehmen wollte.

Man füllte Federhalter auf, statt einen neuen Kugelschreiber zu kaufen.

Man füllte den Rasier mit neuen Blättern auf, statt den ganzen Rasierer wegzuwerfen. Aber es stimmt, man kannte die grüne Bewegung nicht.

Damals benutzten die Leute die Trambahn und die Kinder das Rad, um in die Schule zu gehen, statt

daß man das Familienauto und die Mutter 24 Stunden auf 24 Stunden als Taxiservice benutzte.

Man hatte einen Stecker je Raum nicht einen Mehrfachsteckerschiene, um die ganze Auswahl an

elektrischen Accessoires, die für die heutige Jugend heute unabkömmlich sind, anzuschließen.

Die alte Dame hatte recht, in dieser Zeit, kannte man keine grüne Bewegung. Aber man lebte

jeden Tag mit dem Respekt zur Umwelt.

Die alte Dame redet nicht von einer so alten, weitzurückliegenden Zeit, ich habe sie noch gekannt.

# Se mettre au "vert".

**Quand la vieille femme a choisi le sac en plastique pour ses produits d'épicerie, la caissière lui a reproché de ne pas se mettre au "vert".**

La caissière dit que la génération de la vieille femme ne comprenait tout simplement pas le mouvement environnementaliste; que seuls les jeunes allaient payer pour la vieille génération qui a gaspillé toutes les ressources!

- > La vieille femme s'est excusé auprès d'elle et a expliqué:
- > Je suis désolée, nous n'avions pas le mouvement vert dans mon temps."
- > Alors qu'elle quittait le magasin, la mine déconfite, la caissière en rajouta:

> "Ce sont des gens comme vous qui ont ruiné toutes les ressources à nos dépens. C'est vrai, vous ne considériez absolument pas la protection de l'environnement dans votre temps!"

> La vieille dame admît qu'à l'époque, on retournait les bouteilles de lait, les bouteilles de Coca et de bière au magasin. Le magasin les renvoyait à l'usine pour être lavées, stérilisées et remplies à nouveau; on utilisait les mêmes bouteilles à plusieurs reprises. À cette époque, les bouteilles étaient réellement recyclées, mais on ne connaissait pas le mouvement vert.

> En mon temps, on montait l'escalier: on n'avait pas d'escaliers roulants dans tous les magasins ou dans les bureaux. On marchait à l'épicerie aussi. On ne prenait pas un bolide à 300 CH à chaque fois qu'il fallait se déplacer de deux coins de rue. Mais, c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement vert.

> À l'époque, on lavait les couches de bébé; on ne connaissait pas les couches jetables. On faisait sécher les vêtements dehors sur une corde à linge; pas dans une machine énergétique avalant 220 volts. On utilisait l'énergie éolienne et solaire pour vraiment sécher les vêtements.

> À l'époque, on recyclait systématiquement les vêtements qui passaient d'un frère ou d'une soeur à l'autre. C'est vrai ! on ne connaissait pas le mouvement vert.

> À l'époque, on n'avait qu'une TV ou une radio dans la maison; pas une télé dans chaque chambre. Et la télévision avait un petit écran de la taille d'une boîte de pizza, pas un écran de la taille de l'État du Montana.

> Dans la cuisine, on s'activait pour brasser les plats et pour préparer les repas; on ne disposait pas de tous ces gadgets électriques spécialisés pour tout préparer sans efforts.

> Quand on emballait des éléments fragiles à envoyer par la poste, on utilisait des rembourrages comme du papier journal ou de la ouate, pas des bulles en mousse de polystyrène ou en plastique.

> À l'époque, on utilisait du "Jus-de-bras" pour tondre le gazon; on n'avait pas de tondeuses à essence auto-propulsées.

> À l'époque, on travaillait fort physiquement; on n'avait pas besoin d'aller dans un club de santé pour courir sur des tapis roulants qui fonctionnent à l'électricité. Mais, vous avez raison: on ne connaissait pas le mouvement vert.

> À l'époque, on buvait de l'eau à la fontaine quand on avait soif; on n'utilisait pas de tasses ou de bouteilles en plastique à chaque fois qu'on voulait prendre de l'eau.

> On remplissait les plumes fontaine au lieu d'acheter un nouveau stylo; on remplaçait les lames de rasoir au lieu de jeter le rasoir tout simplement à chaque rasage. Mais. c'est vrai, on ne connaissait pas le mouvement vert.

> À l'époque, les gens prenaient le tramway et les enfants prenaient leur vélo pour se rendre à l'école au lieu d'utiliser la voiture familiale et maman comme un service de taxi de 24 heures.

> On avait une prise de courant par pièce, pas une bande multi-prises pour alimenter toute la panoplie des accessoires électriques indispensables aux jeunes d'aujourd'hui."

> La vieille dame avait raison : à son époque, on ne connaissait pas le mouvement vert; mais on vivait chaque jour de la vie dans le respect de l'environnement.

La vieille dame ne parle pas d'un temps si lointain, moi je l'ai connu.

## Esperanto – Societo Basel — Ĝenerala jarkunveno

**Ni invitas vin por jaŭdo la 28.01.2016 al la Ĝenerala Jarkunveno, en nia kunvenloko en Riehenring 131**

**Komenco je la**

1. **Bonvenigo**
2. **Elekto de la tagprezidanto**
3. **Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno 2015**
4. **Aliĝoj kaj eksiĝoj**
5. **Raportoj** a) de la prezidanto
6. b) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
7. **Senŝarĝigo de la estraro**
8. **Elektoj** a) de la prezidanto
   b) de la vicprezidanto
   c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj
   d) de la sekretario
9. **Kontribuoj** a) al KCE
   b) al pacmovado
   c) al junuloj
10. **Proponoj**

**Tiujn bonvolu skribe prezenti ĝis la 18-a de januaro 2016 al Esperanto Societo Basel.**

**Esperante, ke vi multnombre partoprenos, ni salutas vin samideane.**

**La estraro**

**Kiel kutime ni aldonas enpagilon por la jarkotizo al tiuj personoj, kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al la kasisto.**
**Anticipan dankon.**
**Membro unuopa CHF 25.-**

# JARRAPORTO 2015

Kiel ĉiu jare, raporto estas la okazo trarigardi la aktivecojn de la ĵus pasinta jaro :

En januaro okazis nia Jarkunveno en  Riehenring 131, kie estas vere ege agrable kunveni.

En februaro ni kunsidis en agreabla rondo denove en Saint-Louis, ĉe la restoracio “La Poste” kaj bone diskutis.

En marto ni babilis kviete dum la monata kunveno.

En aprilo estis renkontiĝo 2015 de la „Fadeno” denove en la restoracio „La Poste” en Saint-Louis. Tie estas agrable babili kviete en sufiĉa granda rondo, eĉ se la restoracio mem estas iomete brua.

En majo ni kunvenis en la restoracio 'Akropolis' en Inzlingen, en tre agreabla rondo.

En junio, ni kunvenis en la restoracio 'La Poste', en Saint-Louis kaj babilis agreable kune.

Post la ferioj ni parolis pri niaj someraj aktivaĵoj.

En oktobro ni renkontiĝis kun niaj samideanoj el Saint-Louis kaj ĉirkaŭaĵo en la restoracio “La Poste” en Saint-Louis por agrabla babilado .

En novembro ni denove kunvenis por fari nian programon.

**Nicole Béroud**

# Zamenhof-festo

Karaj geamikoj,
komence de la jaro mi informis i.a. pri la dato de la ĉi-jara Zamenhof-Festo en Frejburgo.
Bedaŭrinde ni ne sufiĉe frue mendis la salonon-do, pro tio ni invitas vin:

**Dimanĉo, la 13-an de Decembro partopreni la Zamenhof-Feston en Frajburgo.**
Kie: en nia nova renkontejo **"Treffpunkt", Salono 5.**
**Schwabentorring 2** (vid-al-vide kaj oriente de la "Schwabentor")
**Ni komencas je la 14-a horo,**

## INVITO al Zamenhofa festo 2015
## en Frajburgo kaj ĝia regiono
### Provizora programo

**dimaĉe la 13a de decembro 2015 ek de la 14a**

Karaj geamikoj,
komence de la jaro mi informis i.a. pri la dato de la ĉi-jara Zamenhof-Festo en Frajburgo. Bedaŭrinde ni ne sufiĉe frue mendis la salonon-do, pro tio ni invitas vin:
**Dimanĉo, la 13-an de Decembro partopreni la Zamenhof-Feston en Frajburgo.**
**Kie:** en nia nova renkontejo **"Treffpunkt", Salono 5. Schwabentorring 2** (vid-al-vide kaj oriente de la "Schwabentor")

**Ni komencas je la 14-a horo,**
**La programo** ankoraŭ estas en naskiĝa stato
-do, eblas oferti ion.
- Ni planas kafo-klaĉon-ankaŭ por re-varmiĝi, se vi antaŭe promenis tra la urbo, aŭ eble vizitis la Kristnaskan Foiron;-prelegetojn (pri niaj Afrikaj projektoj, pri vojaĝoj, . .)
- se restas tempo ankaŭ distran parton; kaj iros vespermanĝi al apuda pi-cejo je la 18-a horo.

**La enirejo** estas je la orienta flanko de la domo.
La renkontejo estas en la 1-a etaĝo, kaj vi devas sonori: la kodo **7724+E**

(tiam sonetas la pordo). Se la pordo ne funkcias, bonvolu sonori je salono 5, "FARBE".
http://www.westermayer.de/manfred/Esperanto.htm *(atentu: se la dato estas eble antaŭ la 2015-10-01-tiam necesus "aktualigi" la ret-paĝon).*
Tiom por nun-kaj por via kalendaro. Pli detala invito sekvos komence de Decembro.
Bondezirojn, amike, manfred, ulla, attila, linus, amina, ramon, gisela, aĉim, . . . .


**Manfred klarigas:**
Do, mia retejo montras informon en Esperanto ankaŭ pri la tramo,
http://www.westermayer.de/manfred/Esperanto.htm
*La aktuala dato devus esti almenaŭ 2015-10-01.*

Estas du proksimaj park-domoj : Schlossberggarage kaj Schwabentorgarage - (sed kostos ĉirkaŭ. 10 EUR) post la kvara horo - jen la ligiloj por aŭto/PKW:
http://www.freiburger-stadtbau.de/parkhaeuser/schwabentorgarage.html
http://www.freiburger-stadtbau.de/parkhaeuser/schlossberggarage.html
Jen la mapo - por tramo kaj aŭto: http://www.westermayer.de/manfred/Treffpunkt_Freiburg_Schwabentorring2.pdf

Do, alveturi per trajno estas alternativo (mi kontrolis por la 13-a de Decembro):
por Edmond eble de Breisach ?
de Müllheim 11:23, 12:23, 12:55 au 13:23
reveturi de Freiburg: 19:15, 19:35, 20:15, 21:45, 23:43
**Kiel atingi la renkontejon "Treffpunkt" ?**
De la stacidomo, ĉirkaŭ. 10 min per tramo No. 1, direkto Littenweiler, haltejo: "Oberlinden". Bonvolu preterpasi la pordegon "Schwabentor", transiri la straton uzante la semaforon, dekstre vi vidas biciklo-vendejon, maldekstre ludsalonon; la renkontejo/Treffpunkt estas en la unua etaĝo.
La pordo troviĝas maldekstre de la konstruaĵo, iru ĉirkaŭ tiu angulo, kie estas la pordo de ludo-salono.

Necesas sonori je FARBE - aŭ uzi la kodon: 7724+E .

**Proponoj de Ursula:**
Por alvojaĝi al la Zamenhoffesto mi rekomendas: po unu bileton "Regio24, Zono3, 5-persona" Ĝi kostas 22,40 € (do por ĉiu unuopulo 4,50 !) Havebla en ĉiu aŭtomato.
Eble Paul volos kunveturi? Supozeble li scias, kiel ricevi el la aŭtomato.



# Esperantista migrado 2015
# Tago en naturparko

Ĉiujare amikoj de la Internacia Lingvo Esperanto renkontiĝas en la Nigra Arbaro por migri kaj viziti interesaĵojn. Ĉi-jare estis ekzakte 22 partoprenantoj, kiuj kunvenis komence de oktobro ĉe la stacidomo de Ottenhöfen.

Post bonvenigo oni unue pluiris al Seebach, cele al turisma vizito de eksaj arĝento-minejoj. La tiea gvidanto komence donis mallongan, fakulan enkondukon en historion de la minejo, geologion, profesiojn, teknikojn kaj ilojn; tiuj klarigoj estis tradukataj de unu el la partoprenantoj, ĉar ok Esperanto-parolantoj el Strasburgo kaj Alzaco ne regis la german lingvon.

Poste kaŭĉukaj botoj, kaskoj, grandaj lampoj kaj pluv-manteloj estis disdonataj, antaŭ ol gaje kaj konvene ekipite supreniri direkte al la enirejo de la Erzknappenloch-galerio, al aventuro subgrunda. Ĉiuj supriziĝis pri la penaj laboroj ene de la monto kaj la tiamaj lumigaj instalaĵoj ĉe la serĉado pri arĝento-havaj ŝtonoj, kvarcoj kaj sedimentoj. Fine de la tunelo atendis sunbrilo kaj varmeco kaj oni estis feliĉa, esti denove ĉe la surfaco. Antaŭ la plu-veturado unue okazis bonvena pikniko - ĝuo-plena, kun la suno dorse kaj en la ombro de la arboj - plia travivaĵo en la naturparko Nigra Arbaro.






De la Ruhestein sekvis migrado ĉe la ski-lifto, sur roko kaj ŝtono, por post la suprengrimpado malstreĉe ĝui la ĉirkaŭ-rigardon. Laŭlonge de la vojo situis multaj ekskurso-celoj, unikaj belvidejoj, aŭtunaj herbejoj, belecoj de la naturo. Ĉe Seekopf (1.013 m) ĉe la Euting-tombejo montriĝis grandioza elrigardo al la tre malsupre kuŝiĝanta lago Wildsee.

La preskaŭ perfekte ronda lago Wildsee troviĝas en speciala Bannwald-regiono, kie la naturo rajtas mem determini la sorton de la arealo kaj ne okazas forstista enmiksiĝo. Aparte impresa estis la elvido de la loko Wildseeblick super la arba maro de la Norda Nigra Arbaro. La parte tra-migrebla Bannwald egalas al praarbaro.

Ankaŭ dum la ekskursa fino en gastejo Grenzstüble ĉiuj ĉeestantoj interparolis en Esperanto. La ceteraj gastoj povis konstati, kiel homoj el diversaj nacioj kapablas interkompreniĝi simple, perfekte kaj humurplene. Kaj tiel oni jam ĝoje anticipis la venontan komunan renkontiĝon.

Engelbert Sester


# La 23-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo Kaj Turismo en Roses, Katalunio

Ĉi-jare de la 3a ĝis la 10a de oktobro okazis la Esperanto-semajno en Katalunio kaj arigis preskaŭ 100 partoprenantojn el 13 eŭropaj landoj. Ĝi okazis en urbeto Roses, ĉe costa Brava, norde de Barcelono, je kvindeko da km de la franca limo. La hotelo disponigis taŭgan salonon por Esperanto-aktivaĵoj. En la hotela restoracio ni ĝuis bufedajn manĝojn ege abundajn kun hispanaj vinoj.

Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la Semajno en ĉeesto de la urbestrino de Roses s-ino Montse Mindam. Ŝi bonvenigis la ĉeestantojn kaj deziris sukceson kaj agrablan restadon en Roses.

Pli poste ekster la hotelo apud la naĝejo okazis komuna fotado en ŝia ĉeesto.



Dum la semajno okazis diversaj prelegoj, diskutoj kaj debatoj.
Rodica Todor el Rumanio lerte sukcesis instigi la partoprenantoj al viglaj diskutoj pri la temo "konfliktoj"
Dalia Pileckiene el Litovio provis klarigi la temon, "Kiel mastrumi nian tempon" .Ŝi ankaŭ proponis analizi problemon laŭ psikologia vidpunkto.



Viglaj diskutoj ekestis, kiuj entuziasmigis plurajn partoprenantojn.
Volonte ni aŭskultis la sintezon de aliaj grupoj.
Krome prelegis Giorgio Silfer el Svislando pri la ĵus aperinta libro "Historio de la Esperanto Literaturo" Li verkis ĝin kun Carlo Minaja.
Marcel Delforge el Belgio klarigis pri la historio de neŭtrala Moresnet, ĉe la limoj de Belgio, Nederlando kaj Germanio.
Buŝs el Latvio prezentis verkojn de la latva poeto Imant Ziedonis.

La urbo Roses estis aŭtobuse atingebla ekde nia hotelo "Sant Marco".



Ĝi estas agrabla turisma urbo, kun du havenoj, por fiŝkaptitstoj kaj por plezurboatoj.

Jen monumento kun muzikistoj. Eblis ankaŭ viziti tie, la citadelon de la 17a jarcento kun grekaj kaj romiaj restaĵoj.

Dufoje la partoprenantoj estis invititaj al tradicia tiel nomata "interkonatiĝa vespero" dum kiuj estis proponitaj vinoj, kataluna ĉampano kaj manĝaĵetoj.

Aparte interesa estis la tut-taga ekskurso al proksimeco de la urbo Figueres. Post vizito al la kastelo Ferran, ni vizitis la mirindan faman muzeon de Saldor Dali. Jam la ekstero kaj la interna korto aperis iom magiaj.



Eskter la muzeo estas rekonabla pro multaj ovegoj sur la tegmento. Kaj interne multaj pentraĵoj misteris pro ofte dueca signifo.





En la antaŭ-lasta vespero koncertis la folklora grupo “Montjuic”, kaj per belaj ĉarmaj kantoj “Habaneras” plezurigis la ĉeestantojn. Iliaj voĉoj kaj kantoj estis vere entuziasmigaj.




Dume jam pretiĝis la specifaj tasoj por la ŝatata "cremat", bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. Tiuj tasoj estis eĉ donacitaj al ĉiuj partoprenantoj.



La koncerto finiĝis per tuko-svingado de la ĉeestantoj, por signi, ke ni revenos venontjare por simila semajno.

En la lasta vespero, la ĉef-organizanto Luis Serrano (baldaŭ 90 jara) deziris fari la sintezon de tiu semajno. Plejparte ĉiuj ŝatis la etoson kaj ĝuis la restadon. Tamen evidentiĝis, ke li bezonus pli da kunhelpantoj por zorgi pri specifaj taskoj.



**Raporto kaj fotoj de Andreo**

La urbo Roses ne estis tiom facile atingebla ekde la flughavenoj de Barcelono kaj Girona. Mankis ĉefe taŭgaj antaŭ-informoj por pluraj eksterlandaj partoprenantoj, kiuj devas taŭge antaŭplani sian forflugon.



# 78a regiona staĝo kaj 37-a BAVELO-Seminario 16a - 18a Oktobro 2015 en Pforzheim

La aŭtuna staĝo de Esperanto-France-Est kaj la seminario de Bavelo okazis ĉi-oktobre en Pforzheim en la proksimeco al Karsruhe. Ni loĝis en komforta junular-gastejo ĉe supro de monteto. Ĝi aspektis kiel malnova kastelo, ĉe unu el la valoj de Pforzheim al Nigra Arbaro.



Rilate al la seminario Roberto raportas pri ĝi:

Jen mia recenzo pri la seminario en Pforzheim, al kiu mi partoprenis la semajnfinon de vendrede 16a ĝis dimanĉe 18a de oktobro 2015. Pforzheim estas urbo en DE-Badeno-Virtemburgio, kaj la aranĝo estis organizita de BAVELO la esperanta regiona asocio.

La organizantoj decidis iom ŝanĝi je tradicia programo, kiu kutime konsistas el kursoj kaj prelegoj (cetere same kiel kutime dum aranĝoj en Alzaco).

La ĉefa ideo ĉi-foje estis pli kaj pli por paroligi la partoprenantojn inter etaj grupoj, analizi la diversajn sintenojn kaj sentojn de la partoprenantoj sub la gvidado de kelkaj animantoj, tiuj de la BAVELO-grupo mem kaj de fakulo pri lernado kaj instruado de Esperanto, kiu venis de la universitato de Poznan (Pollando): mi nomas Aloïs de BAVELO kaj Martin de Poznan.



“Tiuj laboroj” okazis ĉefe sabate matene kaj posttagmeze kaj dimanĉe matene.



Dum tiu du lastaj tagoj okazis ankaŭ turismaj partoj: vizito al la romiaj ruinoj, ĉar Pforzheim estis kreita dum la romia epoko, vizitado al besto-ĝardeno kaj ankaŭ ebleco viziti juvel-muzeon. Vendrede vespere estas tamen la tradicia renkontiĝo de la posttagmezaj alvenantoj, kaj post la vespermanĝo prezentado fare de Johannes Mueller kun kun-




laborantino Eva de Slovakio, de la nova kreita retpaĝo kiu nomiĝas “kern.punkto.info” kaj kiu entenas diversajn fakajn konferenc-recenzojn, rete aŭskulteblajn. Sabate vespere distris nin loka esperantistino, kiu akompanis la kantadojn per sia gitaro. Venis ankaŭ al tiu semanjnfina aranĝo esperantista eminentulo de Germanio, nome la prezidanto de GEA, kiu venis de Berlino. Li parolis kompreneble pri la nacia asocio kaj pri la nova sidejo en la ĉefurbo. Ni ne forgesu la kutimajn “knajpojn” vendrede kaj sabate vespere, kiuj arigas la babilemulojn antaŭ glasojn da (germanaj) biero kaj vino. Ni adiaŭis post la dimanĉa tagmanĝo.

Roberto



Sabate posttagmeze okazis la turisma parto, vizito al la urbo kaj promenado al la tri burgoj, vizito al juvelo-muzeo aŭ al besto-ĝardeno.

Supre de monteto troviĝis monumento pri la historiaj eventoj de la dua mondmilito. Okazis terura bomb-atakoj en februaro 1945. Tial plej partode la urbo aspektas nun tute nova.












**Fotoj de Inge, Bettina kaj Andreo**

Alia grupo viziti la juvelo-muzeon kun entuziasmo.



Dimanĉe matene estis proponita vizito al malnova gaso-stokejo, kiu nun estas uzata por montri la plej grandan panoramo-bildon de la mondo. Efektive grandioza bildo pri la urbo Romo en la jaro 312.


Ĝi ampleksis 360° kaj 15 m da alteco. Kun diversaj sonoj kaj alterne lumigita por tago kaj nokto.

Entute tre bone organizita semajn-fino.

Dankon al la organizantoj.

Andreo

# HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO




La libroj de la biblioteko de Mulhouse-Esperanto estas malnovaj. La animo de nia klubo, Andreo Grossmann, tute pravis akiri la libron **HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO** por nia biblioteko. Tiel dank'al nur unu libro nia biblioteko estas tute kompleta pri la esperanta literaturo. Serioze, tiu libro estas grava libro, kiu bone priskribas 125 jarojn (1887 – 2012) da literatura verkado en la lingvo Esperanto.

En 54 ĉapitroj vi malkovras, kiel nia esperanta literaturo naskiĝis kaj evoluis de Zamenhof, la iniciatinto de la lingvo, kaj de multegaj verkistoj, ne sen prezenti pri ili, biografiajn skizojn kaj historiajn kuntekstojn. La verkoj ankaŭ estas ofte prezentitaj per citaĵoj kaj ankaŭ, por kelkaj el ili, per pli longaj eltiroj en la poezia kaj proza antologia parto (78 paĝoj).

Bone ilustrita, vi trovos ankaŭ en tiu libro riĉajn referencojn kaj indeksojn de la bildoj, verkoj, revuoj, temoj kaj personoj. La libro estas do ilo por la plezuro sed ankaŭ por la studado, fakte ĝis estas ia enciklopedio. La kompetenteco de la aŭtoroj, Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer, aldonas ankoraŭ pli da valoro al tiu verko, kiu estas monumento je 1,6 kg sed multe pli peza pro la nemezureblaj intelektaj plezuroj, kiujn vi trovos en ĝi, inter aliaj pro la konfirmo, ke ni ne vane lernis Esperanton.
La HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO estu en ĉiu biblioteko de la Esperanto-movado sed ankaŭ en la manoj de ĉiu esperantisto.

*Ĉu ĝerm'ni estas en plugita fendo*
*Aŭ nur fabel'mirinda, nur legendo?*

Tiuj versoj cititaj paĝo. 68 estas de Stanislaw Zygmunt Braun, el *Legendo* (1920), poezio pesimisma pri la estonto de Esperanto post la katastrofa mondmilito. Sed per **HISTORIO DE LA ESPERANTA LITERATURO** vi vidas,

ke Esperanto kaj ĝia literaturo ne nur estas fendo, sed granda kampo, kiu nun estas bone plugita kaj la ĝermoj povas kreski por pli kaj pli produkti multnombrajn librojn, tekstojn, poeziaĵojn, verkojn. Oni ne plu parolu pri fabelo aŭ legendo: la esperanto-literaturo estas fakto. Ĝi ekzistas. Oni studas ĝin en universitatoj. Tiu literaturo estis skribita parte kun sango, parte kun espero. Ĝi estas valora parto de la homa kulturo. Ni estu por ĉiam dankemaj al la verkistoj de tiu gravega libro:

**Historio de la esperanta literaturo; *Minnaja, Carlo; Silfer, Giorgio;* Kooperativo de Literatura Foiro; La Chaux-de-Fonds, 2015, 748 paĝoj.**

Bernard Behra

Jen okazo por rememorigi al vi, ke nia grupo havas bibliotekon, kies listo estas konsultebla en nia retejo: http://mulhouse.esperanto.free.fr
Ĝis nun troviĝis en ĝi ĉefe ricevitaj aŭ pruntericevitaj libroj. Jen mi havis okazon akiri tiun gravan verkon pri la Historio de la esperanta literaturo, kaj aldonis ĝin al nia biblioteko. Ĝi estas rezervita al niaj membroj.
Bonvolu informi min pri viaj deziroj pruntepreni librojn. Poste, interkonsente ni profitu la okazon de niaj renkontiĝoj, verda fadeno aŭ kursoj en Espace 110, aŭ alia okazo por transdoni la petitajn librojn.

Andreo

# Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto



La 26an de oktobro okazis nia verda fadeno en Saint-Louis en la restoracio de la Poste. Bona sukceso por tiu kunveno, ni estis 12 el la regiono kune kun gastoj el Bazelo.

Laŭ peto de Nicole Béroud, ni decidis, ke venontaj verdaj fadenoj okazu jene:

- 25an de januaro 2016 en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- 29an de februaro en la restoracio "de la Poste" 10 strato de Huningue en Saint Louis
- 30an de marto en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.

# Deĵorado en Espace 110 kaj en Ungersheim

Jam de kelkaj jaroj nia grupo ekkutimis havi deĵor-tablon ĉe la grava manifestacio de Bédéciné en Illzach kaj ĉe Ekologia foiro en Ungersheim.

Ĉi-jare ambaŭ manifestacioj okazis ne samtempe, tial estis pli facile organizi la deĵoradon. En Illzach ni montris niajn bildstriojn en Esperanto, tie venis Bertrand, Jacques, Ivo kaj Andreo.







En Ungersheim ĉe la Ekologia deĵoris deĵoris Roberto kaj Edmond kaj Andreo.

Tie ni havis bonajn kontaktojn kun homoj, kiuj jam iom eklernis la lingvon aŭ iom sciis pri ĝi kaj ankaŭ kun personoj, kiu vere nenion sciis pri la lingvo.

Tial nia informado estis vere utila. Ni disdonis la novajn kalendaretojn kaj la prospektojn de

**Espéranto La langue équitable**

# KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2016-2018

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivaĵojn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.
La bulteno estas ricevebla en Papera versio aŭ Reta versio (pdf)

**Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**
Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.


| Jaro | Kotizo | Abono | Kolora ekzemplero |
|---|---|---|---|
| 2016 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | 14 eŭroj |
| 2017 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |
| 2018 | 6,50 eŭroj | 6,50 eŭroj | |

# Nia Kalendaro 2015 –2016

| | | |
|---|---|---|
| **novembro**<br><br>**2015** | **06 - 20 - 27-**<br><br><br>**14 - 15**<br><br>**21 - 22**<br><br>**30** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Deĵorado ĉe Bédéciné ekde la 10a ĝis la 18a<br>Deĵorado en Ungersheim ĉe Ekologia foiro, sabate ekde la 14a, dimanĉe ekde la 10a<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21a en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse |
| **decembro**<br><br>**2015** | **04 - 11 - 18-**<br><br><br>**13** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20, laŭ interkonsento.<br>Zamenhof-festo en Frajburgo ekde la 14a. Detalaj informoj en ĉi-tiu numero. |
| **Januaro**<br><br>**2016** | **8 aŭ 15**<br><br>**8 - 15 - 22 - 29**<br><br><br>**25** | Ni kune festu la 3-reĝojn en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a.<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 21a en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse |
| **februaro**<br><br>**2016** | **5**<br><br><br>**26**<br><br><br>**29** | Nia grupo Mulhouse-Esperanto kunvenas por la Ĝenerala asembleo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 aŭ de la 18a30 ĝis la 20a, laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "de la poste" 10 strato de Huningue en Saint-Louis. |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.

# Kion vidas niaj okuloj kaj nia cerbo??



Rigardu ĉi-tiun pentraĵon de proksime kaj ankaŭ de malproksime, eble via cerbo ne vidos la samon.



Preĝejo en Slovakio

Fantazio enire al la muzeo de Salvador Dali



En Roses ĉiu partoprenanto ricevis donace tian taseton, ankaŭ por trinki "Cremat".

